Friedrich Schiller,

# Al la ĝojo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĝojo, bela sparko dia,
de l' ĉielo vi filin',
ĝoje staras ni en via
templo kaj adoras vin.
Sorĉe ĉio religiĝas,
kio apartigis sin,
ĉiuj homoj gefratiĝas,
kie vi restigas vin.

Ĥoro:
Estu chirkaŭbrakumitaj,
lasu kisi vin, homar' !
Estu unu amikar'
ĉiuj homoj disigitaj![2]

Se vi faris grandan ĵeton
kaj amikon gajnis vi,
aŭ akiris virineton,
kunjubilu vi kun ni !
Ja – se vin nur amas iu
en la bela, vasta mond'!
Kiu restas sola, tiu
plore iru el la rond'!

Ĥoro:
......
......
......
......

......
......
......
......
......
......
......
......

. . .

Friedrich Schiller,

# Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea di-filin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:
Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksu kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne – do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:
Ĉiu sub ĉielo glata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

. . .

Friedrich Schiller,

# Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,
d'Elize' filino vi!
En sanktej' benita via
arde vin omaĝas ni.
Sorĉe ligas vi beate,
se disigis malraci'.
Hom' al hom' estiĝas frate,
kie milde regas vi.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

Kiu de amik' fidela
nomas sin amik' de li,
kiu kun edzin' anĝela
vivas, jubiladu pli,
eĉ, se nur al unu koro
ie ligas lin inklin'.
Sed aliaj ja kun ploro
el la lig' forŝtelu sin.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................

. . .

[2] Tiu verso ne tute redonas la enhavon de la koresponda origina strofo.

| | | |
|---|---|---|
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | Ĉu genuas vi, milmiloj? | ...................... |
| ...... | Vi kreinton sentas, mond'? | ...................... |
| ...... | Serĉu super stela rond', | ...................... |
| ...... | loĝas Li trans astro-briloj! | ...................... |
| | | |
| ...... | En eterno de l' Naturo | Ĝojo estas la risorto |
| ...... | Ĝojo estas la risort'. | en eterna la natur'. |
| ...... | En la mondhorloĝ' por kuro | Ĝojo jen per sia forto |
| ...... | radojn pelas ŝia fort'. | movas l'universon nur. |
| ...... | Ŝi el ĝermoj logas berojn, | Florojn el burĝonoj logas, |
| ...... | sunojn regas ŝia gvid' | sunojn, astrojn puŝas ĝi. |
| ...... | Ŝi tra l' spaco rulas sferojn | Sferojn forajn ĝi apogas |
| ...... | trans la astronoma vid'. | en senfina galaksi'. |
| | | |
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | Kiel sur la pompaj vojoj | ...................... |
| ...... | sunoj sur la firmament', | ...................... |
| ...... | gaje marŝu, frata gent', | ...................... |
| ...... | kiel venki la herooj! | ...................... |
| | | |
| ...... | Esploriston ŝi alridas | ...................... |
| ...... | el la fajrspegul' de l' Ver', | ...................... |
| ...... | sur krutaĵ' de l' Virto gvidas | ...................... |
| ...... | ŝi la homon de toler', | ...................... |
| ...... | sur Kred-Monto sunobrila | ...................... |
| ...... | flirtas ŝia flag' el or', | ...................... |
| ...... | ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila | ...................... |
| ...... | vidas ni en anĝel-ĥor'. | |
| | | |
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | Ho toleron, paciencon, | ...................... |
| ...... | fratoj, por pli bona mond'! | ...................... |
| ...... | Donos super stela rond' | ...................... |
| ...... | granda Dio rekompencon! | ...................... |
| | | |
| ...... | Ĉu pripagi diojn? Vanto! | ...................... |
| ...... | Ĉu simili? Bela pen'! | ...................... |
| ...... | Venu ĝoji kun ĝojanto | ...................... |
| ...... | la mizero, la ĉagren'. | ...................... |
| ...... | Venĝ'? Kolero? En forgeson! | ...................... |
| ...... | Jen pardon' al malamik'! | ...................... |
| ...... | Liaj larmoj havu ĉeson, | ...................... |
| ...... | lin ne boru pento-pik'. | |
| | | |
| ... | ... | ... |

| | | |
|---|---|---|
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | En ŝuldlibroj plu nenio! | ...................... |
| ...... | Mondon regu harmoni'! | ...................... |
| ...... | Fratoj! Kiel juĝis vi, | ...................... |
| ...... | tiel juĝos pri vi Dio! | ...................... |
| | | |
| ...... | Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj, | ...................... |
| ...... | en orsango de l' vinber', | ...................... |
| ...... | mildon trinkas kanibaloj, | ...................... |
| ...... | heroecon malesper'. | ...................... |
| ...... | Se rondiras la botelo, | ...................... |
| ...... | fratoj, saltu el la sid', | ...................... |
| ...... | ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo: | ...................... |
| ...... | Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'! | |
| | | |
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | Himnas Lin abismo stela, | ...................... |
| ...... | serafar' kun glora cit'. | ...................... |
| ...... | Jen ĉi glas' por Bon-Spirit', | ...................... |
| ...... | supre, trans la tend' ĉiela! | ...................... |
| | | |
| ...... | En suferoj: firma forto, | ...................... |
| ...... | al senhelpaj: ŝirma brust', | ...................... |
| ...... | eternec' al ĵura vorto, | ...................... |
| ...... | eĉ al malamiko: just'. | ...................... |
| ...... | Virfiero kontraŭ tronoj, | ...................... |
| ...... | kvankam sangon kostu spit', | ...................... |
| ...... | al merito estu kronoj, | ...................... |
| ...... | kaj pereo al insid'! | |
| | | |
| Ĥoro: | Ĥoro: | ..... |
| ...... | Fermu vin en sankta rondo, | ...................... |
| ...... | Ĵuru do kun glaso-lev', | ...................... |
| ...... | pri l' fidelo al la Dev', | ...................... |
| ...... | je l' Reganto de l' Stel-Mondo! | ...................... |

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* Friedrich Schiller *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

*Arg-133-264 (2004-01-16 21:22:19)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* Friedrich Schiller *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* Kálmán Kalocsay *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976) en 1958.*

*Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* Friedrich Schiller *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)*